**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 26

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

1.Tablon ␣ **r** ␣ ␣ **m** ␣ ␣ ne tuko, sed kuko.

**2.** Diri al iu ␣ ␣ **d** ␣ ␣ veron.

**3.** Ne kvanto, sed ␣**v**␣ **l** ␣ **t** ␣ decidas pri merito.

**4.** Ekstere regis malvarma vintro, ĉio kuŝis kovrita de glacio kaj neĝo kaj ␣ **r** ␣ **d** ␣ vento tranĉis al ĉiu la vizaĝon.

**5.** Fine mi nur volas aldoni, ke ␣ ␣ **nĝ** ␣ ␣ estas parto de nia ĉiutaga vivo, kiu okazas dum ni dormas kaj do ili estas iel kaj iusence gravaj, signifaj kaj mesaĝ-donaj.

**6.** Sur la maldekstra pojno videblis multekosta brakhorloĝo, sur la dekstra estis peza ora ĉeno kaj kelkaj oraj ␣ **i** ␣ **g** ␣ ␣ ornamis liajn fingrojn.

**7.** Seamus Heaney malgraŭ sia **h** ␣ **m** ␣ **l** ␣ kamparana origino, estis ege dokta kaj erudita homo.

**8.** La junulino estis modeste vestita – malhela pantalono, ruĝa **k** ␣ **t** ␣ **n** ␣ bluzo kaj nigra sporta jako.

**9.** La sonĝo nur memorigis al Viktor okazintaĵon de antaŭ tre longa tempo, kiam li estis studento, dum la foraj jaroj de la juneco, plenaj je ␣**v**␣ **nt** ␣ **r** ␣ ␣.

**10.** Por ebligi tradukon de la subtekstoj en plurajn lingvojn oni devas ␣ **g** ␣ **rd** ␣ sian kanalon kaj elekti la idiomojn, en kiuj oni volas ricevi tradukojn.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Dum dua vojaĝo al Oriento Roerich kolektis unikajn m ␣ **t** ␣ **r** ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣ pri kulturoj de vizititaj landoj.

**2.** Oni hipotezas, ke ŝarkoj konfuzas surfanton aŭ plonĝanton en **k** ␣ **ŭĉ** ␣ **k** ␣ kombineo kun foko aŭ otario kaj la plej kutima atako estas “akcidento”, en kiu naĝantoj kaj surfantoj fariĝas viktimoj.

**3.** Holmes kaj Watson glisis per **b** ␣ **l** ␣ **n** ␣ kaj perdiĝis; vidinte homon surtere, ili iom malaltiĝis kaj demandis: “Kie ni estas?” Iom pripensinte, la homo respondis: “En la korbo”.

**4.** La venontan tagon mi veturis per **a** ␣ **t** ␣ **b** ␣ **s** ␣ tra la montara kamparo de Viseu, kie oni intense uzas venton por produkti elektron.

**5.** **M ˽ l ˽ ˽ ˽ ŭ** tio, ke la temoj de la libroj estas tute diversaj, en mia percepto ili facile unuiĝas sub unu ĝenerala demando pri la esenco de homa ekzisto.

**6.** Fakte, dum la dua duono de sia vivo Oosugi suferis pro manko de **k ˽ m ˽ r ˽ d ˽ ˽**, kiuj estis murditaj pro politikaj kialoj, kaj fine la sama sorto trafis lin mem.

**7.** Kalkulite estas, ke en la nuna jaro, eĉ antaŭ la aprila katastrofo, jam **d ˽ ˽ n ˽ ˽** en Mediteraneo plurcentoj da nord-afrikanoj.

**8.** Krom plenkolora kovrila portreto de Lapenna la allogon de la libro kreskigas abunda kolekto de fotoj el la **p ˽ ˽v˽ t ˽** kolekto de s-ino Lapenna.

**9.** Mi, en plena konfuziĝo, **m ˽ r ˽ ˽ r ˽ ˽** iun pardonpetan vorton al la ĝenita sinjoro, kaj ni residiĝis sur niajn antaŭajn lokojn.

**10.** Estonteco sen ekonomia kresko povas **s ˽ g ˽ ˽ f ˽**, ke la homo, liberigita de la penso pri ĉiam kreskanta materia nivelo, trovas trankvilon por pli noblaj celoj.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

forĝ', hotel', detru', diskut', acid', frost', bret', flos', aparat', fald'.

**1.** Organizaĵoj de medicinistoj plendas pri la malbonaj laborkondiĉoj en lokoj, kie mankas laŭ ili minimuma ˽ ˽ ˽ **r** ˽ ˽ ˽ **r** ˽ por dece akcepti pacientojn.

**2.** La murojn de lia kabineto plafon-alte tegas ˽ **r** ˽ ˽ ˽ **r** ˽ ˽ kun libroj kaj videoj.

**3.** Nepre estu singarda pro ˽ **l** ˽ ˽ ˽ **n** ˽ ˽ krokodilo, aparte proksime al estuaro – ĝi manĝas malofte, sed vi ja ne volas esti ties postfasta matenmanĝo.

**4.** La transportsektoro preskaŭ ekskluzive dependas de fosiliaj energifontoj, ĝi riskas iĝi la ĉefa kaŭzo de ˽ **c** ˽ ˽ ˽ **g** ˽ ˽ emisioj en EU.

**5.** La cetera parto de la korpo de la ina mamutido restas ĝis nun profunde ˽ ˽ ˽ **s** ˽ ˽ **g** ˽ **t** ˽ kaj admireblas en vitrino je 22 celsiaj gradoj.

**6.** La morbo jam estigas perdojn ne nur inter bienistoj, sed ankaŭ inter ˽ ˽ **t** ˽ ˽ ˽ ˽ **t** ˽ ˽ kaj aliaj, kiuj vivtenas sin pere de turismo.

**7.** Tiu esplora universitata projekto estas iom kurioza, sed sendube interesa kaj ˽ ˽ **s** ˽ ˽ ˽ ˽ **g** ˽.

**8.** Ni devas atendi ĝis mateno, tiam oni povos venigi ˽ ˽ ˽ **ĝ** ˽ ˽ **t** ˽ ˽, por trafajli la ferajn stangojn.

**9.** Ekzistas eksteraj klavaroj ˽ ˽ **l** ˽ ˽ ˽ **l** ˽ ˽, kiuj faldite estas samgrandaj kiel la poŝkomputilo mem.

**10.** En 1809, en la militiro kontraŭ Aŭstrio, Napoleono pasigis unu nokton en la hungara urbo Győr kaj propramane indikis 9 partojn ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **d** ␣ ␣ ␣ en la urbomuro.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Reveninte hejmen, la pastro sciiĝis pri la malapero de la sebo kaj la ĉapo kaj li tuj ___, kiu estis kulpa en tio ĉi.

**a.** konfidis **b.** divenis **c.** penetris **d.** baraktis

**2.** Mentezufis dismetis la armeon sur la norda flanko de la valo kaj ___ ĝin en tri korpusojn.

**a.** oscedis **b.** dividis **c.** paŝtis **d.** insultis

**3.** Cetere por kio mi parolu al vi, kion mi pensas pri ĉi tiu afero, legu miajn ___.

**a.** artikolojn **b.** anĝelon **c.** vulpon **d.** modelon

**4.** En la jaro 2000 la germana registaro decidis, ke Germanio estu la unua industria povo, kiu iras al tuta forlaso de la nuklee produktata ___.

**a.** beno **b.** vualo **c.** biblioteko **d.** elektro

**5.** Kiel aneksaĵojn la libro enhavas kronologian ___ de la vivo de ĝia talentega aŭtoro Edmond Privat kaj eltiraĵon el lia bibliografio.

**a.** tabelon **b.** abelo **c.** kamionon **d.** bluzon

**6.** En tiuj mesaĝoj Mikrosofto klarigas kelkajn el siaj ___ kiel kontraŭbatali Linukson, la libere haveblan mastrumsistemon, specon de Unikso.

**a.** palacoj **b.** kandeloj **c.** ortoj **d.** planoj

**7.** Li havis teruran ___, tiel ke li prefere povus uzi litotukon anstataŭ poŝtukon.

**a.** sekretarion **b.** kronon **c.** kataron **d.** ritmon

**8.** La parlamenta balotado proksimas kaj ĝi devos montri la veran ___ de la loĝantaro.

**a.** kastelon **b.** elefanton **c.** krizon **d.** humoron

**9.** La pura, larĝa ŝtuparo kondukis al la pli alta ___ de la konstruaĵo.

**a.** bazaro **b.** etaĝo **c.** emocio **d.** ŝvito

**10.** La komenco de ricevado kaj elsendado de ___ mesaĝoj estas ligita al la nomoj de la italo Guglielmo Marconi kaj de la ruso Aleksander Popov.

**a.** ekstremaj **b.** dungaj **c.** sovaĝaj **d.** telegrafaj